

# La Progresanto

REDACTIE-  
COMMISSIE:  
G. P. DE BRUIN  
TH. BUIJS  
G. J. DEGENKAMP

**STUDIEBLAD VAN DE FEDERATIE  
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**  
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

F. FAULHABER  
W. F. KRUIT  
J. A. C. LEM JR.  
H. VAN LIER  
H. VELTHOVE

REDACTIE-ADRES: G. J. DEGENKAMP, RIETSTRAAT 40, UTRECHT

## Belangrijk.

Wij maken er onze lezers op attent, dat het Redactie-Comité van „La Progresanto” in October vergadert om plannen voor de volgende jaargang te bespreken. Het is onze wens alle lezers zo veel mogelijk ter wille te zijn en de inhoud van ons studieblad zo aantrekkelijk en veelzijdig mogelijk te maken, opdat ieder er datgene in vinde, wat hij in het bijzonder behoeft of op prijs stelt. Wij verzoeken daarom ieder, die voor 1939 bijzondere wensen heeft, ons zijn verlangens vóór 1 October kenbaar te maken, zodat wij daarmee rekening kunnen houden.

Redactie.

## Logiko kaj reakcio kontraŭlogika.

Esperanto estas logika.

Esperanto estas bazita sur la naciaj lingvoj.

Jen du faktoroj, kiuj konstante influas la evoluon de nia lingvo, ofte en direktoj inter si kontraŭaj. El la naciaj lingvoj novaj formoj enkondukiĝas en Esperanton kaj la logiko repuŝas tiujn el ili, kiuj ne estas konformaj al ĝi. Kaj inverse, sur logika bazo konstruiĝas novaj aŭ pli korektaj formoj kaj la reakcio protradicia klopodas ilin eljeti.

Unu el la formoj el la dua kategorio estas *tiom* kaj *kiom*, pli kaj pli anstataŭanta la malpli korektan uzadon de *tiel* kaj *kiel* por signifo grada. Por ke oni povu klare prezenti al si tiun ĉi aferon, ni antaŭe rigardu pri ĝi la ekzemplojn de Zamenhof kaj poste ni klopodu formi al ni bildon pri la signifoj de la korelativaj serioj *-iel* kaj *-iom*:

Por esprimi difinitan, rilatan kaj demandan gradojn de kvalito Zamenhof uzis *tiel* kaj *kiel* (*Mi estas tiel forta, kiel vi*, Ekz. § 10).

Por esprimi gradon de kvanto Z. uzis jen *tiel*, jen *tiom* (*tiom multaj*, „Batalo de l'Vivo”, 7-26).

Por esprimi nedifinitan gradon de kvalito Z. uzis preskaŭ senescepte *iom* (*laboro iom pli malfaciila*, „Marta”, 89-26; *fariĝos iom post iom potenca*, „Originala Verkaro”, 159-16).

Por esprimi rilatan gradon en la senco „en kiu grado” Z. uzis *kiom* (*mi scias, kiom mi povas kredi al ĝiaj rakontoj*, „Batalo de l'Vivo”, 25-24).

Por esprimi difinitan gradon en komparativo Z. uzis preskaŭ regule nur *tiom* (*tiom pli gaja estos*, „Batalo de l'Vivo”, 59-23, *la muziko, plaĉis al mi tiom pli, ke*, „Batalo de l'Vivo”, 10-18).

Evidentiĝas do, ke por esprimi gradon Z. uzis jen *-iel-*, jen *-iom-*vortojn, kio ne estas konsekvenca.

Tamen, por esprimi manieron de ago kaj specon aŭ manieron de kvalito Z. uzis tute konsekvence *-iel-*vortojn (*Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem*, Ekz. § 18).

Ni do konstatas, ke manieron indikas la *-iel-*vortoj, kaj gradon kaj *-iel-* kaj *-iom-*vortoj. Pro tiu fakto ni inklinas kredi, ke la *-iel-*vortoj ekskluzive indikas manieron kaj la *-iom-*vortoj ekskluzive kaj logike nur gradon (aŭ kvanton), ĉar estus sensece kredi, ke ekzemple *tiel* povas indiki gradon, *iel* neniam kaj, en specialaj propozicioj (*tiom pli, ke kaj tiom pli, ĉar*) grado estas indikata nur de *tiom*. Pro la nereguleco kaj nekonsekvenceco de la zamenhofaj ekzemploj ni do rajtas konkludi, ke parto de liaj ekzemploj estas erara aŭ almenaŭ malpli ĝusta. Kaj eraraj povas esti nur liaj *-iel-*formoj en signifo de grado, ĉar krom tiuj formoj li uzis ankaŭ *-iom-*vortojn por tiu signifo, kiel ni jam menciis.

Ni aldonu ankoraŭ, ke liajn *-iom-*formojn, por esprimi gradon, transprenis senescepte ĉiuj bonaj verkistoj (ekz.: *iom alta, iom post iom, tiom pli, ke kaj tiom pli ĉar*) kaj ke neniu bona esperantisto anstataŭe skribus: *iel alta, iel post iel, tiel pli, ke*.

Por pruvi la erarecon de la zamenhofaj *-iel-*formoj kun signifo grada, ni klopodu serĉi la kaŭzon, pro kiu Z. esprimis certajn okazojn per *-iel-*vortoj anstataŭ per vortoj finiĝantaj per *-iom*:

La pli multaj eraroj farataj de ĉiuj esperantistoj baziĝas sur iliaj naciaj lingvoj. Kaj, ĉar ankaŭ Z. estis homo eraripova kaj, konsiderante la multajn kaj gravajn malfacilaĵojn, antaŭ kiuj Z. kiel unua esperantisto staris, ni povas facile kompreni, ke la eraroj, kiujn li faris, okazis sub influo de lia nacia lingvo, la pola. Konstatinte, ke la signifojn „kiumaniere” kaj „kiugrade” en la pola lingvo — same kiel en pluraj aliaj lingvoj — indikas unu sama vorto: *jak* kaj ke la signifoj „tiumaniere” kaj „tiugrade” esprimiĝas per la vorto *tak*, ni komprenas, ke eĉ Z. povis intermiksi tiujn ĉi ideojn, uzante certaokaze por unu signifo erarajn vortojn. Krome ni povas konstati, ke ankaŭ en aliaj lingvoj la menciitaj signifoj havas samsonajn aŭ preskaŭ egalajn tradukojn; jen la kaŭzo, pro kiu multaj aŭtoroj senpripense imitis la erarojn unuafoje faritajn de Z.

Ni aldonu ankoraŭ, ke jam de la unuaj jaroj de Esperanto pluraj aŭtoroj faris erarojn en la aplikado de certaj korelativoj, skribante ekzemple: *ĝi estas tiel; kiel estas la vetero?; tia, kiel aŭ tia, kiu*. Diversaj lernolibroj konstruis el tiuj eraraj ekzemploj erarigajn regulojn kaj eĉ nuntempaj t.n. bonaj aŭtoroj ofte intermiksas la vortojn *tiel, tiom, tia, resp. kiel, kiom, kia*.

Pruviĝas do necese fari iom da ordo en tiu neĝusta kaj nekonsekvenca uzado. Al tio multe kontribuis la Cseh-metoda instruado, ĉar tiu ĉi metodo scias bonege utiligi la korelativan tabelon, ĝuste pro ĝia sistemeco. Kaj tuj, kiam en tiun sistemon enŝteliĝis eraro aŭ eĉ nur neperfektaĵo, la metodo per si mem korektas ĝin. Kaj kvankam la *-iom-*vortoj en tiu metodo eble ne estas jam ĝenerale uzataj por esprimi gradon, tio pruvas nur, ke ĝi ankoraŭ ne eluzis ĉiujn eblojn de la korelativa sistemo. Ekzemple por ricevi respondon „*iom malsana*” la instruanto nepre devas demandi: „*kiom malsana?*” kaj ne: „*kiel malsana?*” Sed vero estas, ke la Cseh-metodo donis fortan puŝon en la direkto al nepre logika pensado; kaj la esperantistoj

daŭrigis sur tiu vojo, konforme uzante *iom*, *tiom*, *ĉiom* kaj *neniom*, kiel respondojn al *kiom*?

Kiel ĉia logika pliboniĝo, ankaŭ tiu ĉi kaŭzis reakcion. Al tiuj, kiuj ĉiam skribis *tiel* kaj *kiel* nur pro tio, ke ili lernis tion en siaj malnovaj neperfektaj lernolibroj, sed neniam pripensis, ĉu la uzataj formoj estas logikaj aŭ ne, ne estas facile tuj ŝanĝi kutimon. Sed la sola argumento, kiun reakciuloj povas elpensi, por kontraŭi logikan uzadon de *tiom* kaj *kiom*, estas tre mankhava. Oni nome elpensis, ke ne la *-iom*-vortoj indikas gradon, sed la *-iel*-vortoj. Sed unue, tiuj, kiuj asertas tion, do pro tio devas cedi la uzadon de *iom* kaj *tiom* en ekz. *iom granda* kaj *tiom pli granda*, ĉar tiu uzado estas nepre kontraŭa al ilia cetera *-iel*-uzado. Kaj due, al ĉiu, kiu scias logike pensi, estas klare, ke la ideoj „grado” kaj „maniero” estas inter si tre diferencaj kaj ke la ideoj „grado” kaj „kvanto” estas inter si parencaj, ĉar grado estas kvanto de kvalito.

Laŭ logika percepto ni eĉ preferus doni al la *-iom*-vortoj unuavice la signifon „grado” antaŭ „kvanto”, ĉar en sia kvanta signifo la *-iom*-vortoj ne estas plene konformaj al la logiko. En la ekzemplo *iom da prudento estas bon'* ni eĉ *iom* hezite uzas *bone* anstataŭ *bona*, sentante, ke logike *bon'* indikas kvaliton de substanco, sed gramatike ĝi komplementas la adverbon *iom*. En sia kvanta signifo la *-iom*-vortoj do havas substantivan sencon, kiun ili gramatike ne havas. Sed la reguloj de la Esperanta gramatiko jam estas fiksitaj; nepre logika neni lingvo povas esti; ni do kontentiĝu pri la grado de logiko, kiun Esperanto almenaŭ povas havi!

Sed aliflanke ni permesu al la logiko, ke ĝi influu la lingvon *tiom*, *kiom* eblas kaj neni havas la rajton kondamni tion, ĉar — laŭ Zamenhof mem — „ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan.”

---

---

## Por Komencantoj.

H. van Lier.

Opgave 33. Vertaal in het Esperanto:

1. Deze in aanbouw zijnde bioscoop zal meer bezoekers kunnen bevatten dan beide bestaande tezamen.
2. Verleden week hebben wij het Hilversumse raadhuis bezocht.
3. Allen waren van mening, dat de Hilversummers met recht trots kunnen zijn op hun mooie gebouw.
5. Zijn correspondentie is duidelijk leesbaar.
6. De spreker had goed contact met zijn gehoor.
7. Aan het einde van zijn rede juichten de toehoorders den spreker luide toe.
8. Zij zag haar broer juist, toen hij zijn fiets in de schuur zette.
9. Terwijl hij zijn sleutels uit zijn zak haalde, deed zijn moeder de deur open.
10. Die man is erg verouderd. Een verouderd model.



Vertaling van opgave 25.

1. Estas<sup>1)</sup> tre bela somervetero<sup>2)</sup>. La suno fort(eg)e brilas<sup>3)</sup> kaj la ĉielo<sup>4)</sup> estas hele<sup>5)</sup> blua.

<sup>1)</sup> Het wordt niet vertaald, omdat de zin onpersoonlijk is. <sup>2)</sup> Of: *somera vetero*. <sup>3)</sup> Niet: *ŝajnas* = schijnen, lijken, er uit zien alsof. <sup>4)</sup> Niet: *aero*

= lucht, die wij inademen. <sup>5)</sup> In dit geval kan men toevallig ook *klare* gebruiken; *hele blua* = de tint van het blauw: *helder-, lichtblauw*; *klure blua* = onbewolkt.

2. De Bilt havigis<sup>1)</sup> trafe<sup>2)</sup> gustajn informojn<sup>3)</sup> pri la vetero.

<sup>1)</sup> Of: *donis*. <sup>2)</sup> Niet: *frapante* = frapperend, bijzonder treffend; in dat geval zou *frape* beter zijn dan *frapante*, omdat de deelwoordelijke uitgang hier geen zin heeft; ook niet: *trafajn*, *treffen* slaat hier op *juiste*.

<sup>3)</sup> Of: *komunikojn*.

<sup>1</sup> 3. Vi lernis<sup>1)</sup> vian lecionon efektive<sup>2)</sup> bone.

<sup>1)</sup> *Estas lerninta* kan hier wel, maar de samengestelde tijd is overbodig.

<sup>2)</sup> Of: *vere*.

4. La botelo estas preskaŭ tute plena. Tiu ĉi revuo<sup>1)</sup> estas belege<sup>2)</sup> ilustrita.

<sup>1)</sup> Of: *gazeto*; niet: *jurnalo* = *dagblad*. <sup>2)</sup> Zie: 2.<sup>2)</sup>.

5. Mia onklo posedas pentraĵon, kiu estas<sup>1)</sup> minimume 200-jara<sup>2)</sup>.

<sup>1)</sup> Niet: *ekzistas*: wel kan *zijn* door *ekzisti* vertaald worden, maar alleen, als het door *bestaan* te vervangen is, bijv.: Er bestaan mensen die.... = *Ekzistas homoj, kiu.j....* <sup>2)</sup> Of: *havas minimume 200 jarojn*.

6. Nia kunveno estis tre bone vizitata<sup>1)</sup>. La salono<sup>2)</sup> estis apenaŭ sufiĉe granda.

<sup>1)</sup> Of: *ĉeestata*; niet: *-ita*; dit is een van de weinige gevallen, waar de vorm *was be-* niet door *ĉeestis -ita*, maar door *estis -ata* vertaald moet worden (zie „Konsilanto”, blz. 42); *viziti* moet niet opgevat worden als de handeling *komen*, die afgelopen is, als men reeds aanwezig, dus al gekomen is, maar als: *op bezoek zijn*. Zou men toch vertalen: *estis vizitita*, dan zou de zin logisch om een tweede zin daarachter vragen, die handelt in de tijd NA de vergadering. Dit is echter NIET zo, want: de zaal was nauwelijks groot genoeg, niet NA, maar TIJDENS de vergadering. We blikken dus terug regelrecht naar de vergadering zelf. <sup>2)</sup> Of: *kunvenejo*.

7. Naĝante<sup>1)</sup>, la viro forgesis ĉion ĉirkaŭ si<sup>2)</sup>.

<sup>1)</sup> Onderwerp van hoofd- en bijzin is dezelfde persoon, dus gebruiken we een bijwoordelijk deelwoord i.pl.v.: *kiam la viro naĝis*. <sup>2)</sup> Niet: *li*, want *zich* behoort bij het onderwerp. *Zich* is ALTIJD *si*. Wel kan men zeggen: *ĉion, kio estis ĉirkaŭ li*, zoals één inzender deed; dan immers is *kio* een nieuw onderwerp, waarop *li* dan niet slaat; *zich* is dan ook *hem* geworden. Maar deze vertaling is te vrij.

8. Dum (kiam) la viro naĝis<sup>1)</sup>, la ŝtelisto ŝtelis la (poŝ)horloĝon.

<sup>1)</sup> Nu niet: *naĝante*, want onderwerp van hoofd- en bijzin zijn niet gelijk. Ook: *estis naĝanta*.

9. Estos<sup>1)</sup> tre malfacile kapti la ŝteliston<sup>2)</sup>.

<sup>1)</sup> Onpersoonlijk; *het* wordt niet vertaald. <sup>2)</sup> Of: *ŝtelinton*.

10. Ŝtelinte<sup>1)</sup> la horloĝon<sup>2)</sup>, li malaperis sen (post(e)signo<sup>3)</sup>).

<sup>1)</sup> Zie 7.<sup>1)</sup>. <sup>2)</sup> Het is niet nodig altijd door *poŝhorloĝo* te vertalen; het kan ook wel eens een polshorloge zijn. Daarom is *horloĝo* alleen meestal reeds voldoende. <sup>3)</sup> Niet aan te bevelen is: *malaperis netrovebla*; dit is een ongewone en niet gemakkelijk te verdedigen bepaling van gesteldheid.

---

---

## Men vraagt ons:

In aansluiting op ons antwoord in L.P., blz. 103 over *laberdano* (zoutevis), deelt een lezer, S. de P. en H. ons welwillend mede, dat dit woord in „La Revizoro” voorkomt (43-2), dus van Zanenhof zelf afkomstig is, waarmee o.i. tevens bepaald is, dat *labardano* (met a) is af te keuren.

# Provalu la memoron!

Jac. Lem.

Opgave 34.

Vertaal de tussen haakjes geplaatste woorden en vul de van een streepje voorziene woorden in.

## La azeno en leona felo.

1. (Het gebeurde eens), ke azen—, trovinta leon— fel—, surmet— ĝin kaj elir— por timig— ĉiuj— senkulp— best—.
2. Vidante vulp—, la azen— klopod— ankaŭ ĝin timig—.
3. Sed, Rejnardo, ki— jam aŭd— (zijn) voĉ—, dir—: „Kred— min, ankaŭ mi certe (zou bang zijn), se mi ne (had gehoord) vi— azen— blekad—”.

## La rano kaj la virbovo.

4. Virbov—, ki— paŝtig— en marc— kamp—, hazarde met— la krur— sur ranid— kaj mortprem— ĝin.
5. Ali— ranid—, ki— apenaŭ pov— sin forsav—, rapid— al (zijn) patrin— por rakont— la malbon— novaĵ—.
6. „Ho, patrin—!”, ĝi dir—, „best—, (zo'n) grandeg—, kvarpied— best— far— ti—!”
7. „Grandeg—?”, dir— la patrin— rano, „(hoe) grandeg—? Ĉu ĝi est (zo) grand—” ...kaj ĝi plenblov— sin.... „(zo) grand— (als) mi?”
8. „Ho”, dir— la ranid—, „mult— pli grand—!”
9. „(Zo) grand—?” kaj la patrin— rano ankoraŭ pli plenblov— sin.
10. „Kred— min, patrin—, se vi (opbliet) vin, ĝis kiam vi (barstte), vi eĉ ne duone (zoudt zijn) (zo) grand—, (als) ti— best—”.
11. (Toen) la patrin— (werd kwaad) kaj denove klopod— sin plenbov—, sed, ho ve, ...ĝi krev—.

## La leono, la urso kaj la vulpo.

12. Leon— kaj urs— trov— cervid— kadavr— kaj (begonnen te vechten) pro tio.
13. Ili (zo) terure kaj kruise interbatal—, ke finfine ili ambaŭ est— duon— blind— kaj mort—.
14. (Zo) senfort— ili est—, ke (geen van beiden) pov— kapt— la rabaĵ—, ki— kuŝ— inter li.
15. Post kelk— temp— vulp— preterir— kaj vid— (hoe) malfort— ili (waren).
16. La vulp— trankvile proksimiĝ— kaj pren— la cervid—.
17. „Ho”, (klaagden) la interbatalint—, „(hoe) stult— ni est—; ni foruz— ĉi— ni— fort— kaj vund— unu la al—, nur por don— manĝaĵ— al fripon—”.

(El Fabeloj de Ezopo.)



Invulling der woorden van opgave 26.

1. Aŭdis, plendis, nekapableco, hufoj, respondis, leono.
2. Agis, prave.
3. Vidu, miajn, ungegojn, estas kapablaj.

4. Vidu, kapablecon, miaj, dentoj.
5. Tio, mangis, kaprinon.
6. Junulo, pripensis, rigardis, siajn, brakojn, longaj, fortaj, fortikaj.
7. Trovis, ilin, kapablaj, ekintencis, devigi, sian, plijunan, fraton, servi.
8. Petis, depreni, fruktojn, respondis, vidu, miajn, brakojn.
9. Diris, atingas, granato.
10. Servu, mangêgu.
11. Servis, plijuna, frato, malplijunan.
12. Gojis, malkovro, ŝuldas, leono.
13. Restis, nuna, tago.

Korektoj: La unua vorto de „Opgave 30” devas esti anstataŭ *Jam: Iam*.  
Legu en „Opgave 22”, pĝ. 117, post 7: *ebenejo* anstataŭ *ebenejon*.

## Fundamento de Esperanto.

Er bestaat in Esperanto een klein boekje, waarvan men de titel hierboven vindt afgedrukt. Dit werkje is voor het eerst verschenen in 1905 en is door het in dat jaar gehouden Algemeen Esperanto-Congres (Universala Kongreso) tot de onaantastbare grondslag van Esperanto verklaard. Er bestaat een vijftalige uitgave (duits, engels, frans, pools en russisch) en verschillende aparte uitgaven in nationale talen. De vlaams-nederlandse uitgave verscheen in 1922. De inhoud bestaat uit: Spraakleer, oefeningen en woordenboek.



Er zijn helaas tal van esperantisten, die dit boekje niet in hun bezit hebben of het zelfs niet hebben gelezen. En toch is het een der belangrijkste werken uit de Esperanto-literatuur. In de eerste plaats, omdat het de onaantastbare grondslag van onze taal bevat. Dit wil zeggen, dat die taalregels, die verbeelden, die woorden, welke in dit boekje voorkomen, door geen enkele esperantist gewijzigd kunnen worden. Daardoor is Esperanto beveiligd tegen veranderingen of z.g. verbeteringen naar persoonlijke smaak van personen of organisaties, die, hoe goed bedoeld ook, de ondergang van de taal tengevolge zouden hebben. Het is dus van veel belang, dat iedere esperantist met het Fundamento bekend zij, opdat hij wete, welke regels of woorden onaantastbaar zijn, en hij zich kan onthouden van het gebruik van vormen of uitdrukkingen, die niet toelaatbaar zijn.

Beter dan wij dit hier kunnen doen heeft Dr. Zamenhof zelf in het uitvoerig „Voorwoord” van het Fundamento de noodzakelijkheid van een onaantastbare grondslag uiteengezet. Bovendien geeft hij daarbij een duidelijke verklaring, hoe Esperanto ondanks de onaantastbaarheid van zijn Fundamento, zich verder ontwikkelen kan en rijker aan woorden, vormen en uitdrukkingen kan worden. Daardoor is vooral ook dit „Voorwoord” in hoge mate lezenswaardig.

Opgave 35. Vertaal in het Esperanto:

(Vervolg van „Het eerste Esperanto-examen in Nederland”).

13. Ik was mij in mijn kamer en zij wast zich in de hare.
14. Waar zult ge zo dadelijk heen gaan? Nergens.
15. Ik had een brief geschreven, toen de brievenbesteller kwam.
16. Ik zou juist uitgaan, toen ik plotseling een brief kreeg, waarin ik las, dat ik thuis moest blijven.
17. Men beval „Voorwaarts! achterwaarts! rechts! links!”
18. Al wandelend viel ik. Een appel gevonden hebbende, at ik hem op.
19. De drenkeling (de te reddene) riep om hulp; de redder sprong te water, dook en terstond daarna werd de drenkeling gered en door den redder naar huis gebracht.
20. Een man, die zijn moeder vermoord heeft, (te vertalen door één woord) is een misdadiger.
21. Daar is room, neem er wat van.
22. Ik heb twee zoons, de jongste is nu ziek, de oudste gelijkt op zijn moeder.
23. Het huis, waarin men leert, is een school.
24. Laat den geneesheer komen.
25. Lutheranen en Calvinisten zijn christenen.
26. Van al mijn kinderen is Ernst de jongste.
27. Hij zingt het best, wanneer hij alleen is.
28. Zij sloegen elkander.
29. Daar is uw hoed en hier is de mijne.
30. De bomen, bloemen en andere gewassen van deze tuin zijn prachtig.
31. Het huis, welks dak ge daar ziet, behoort aan mijn oom.
32. Ik arresteerde alle misdadigers; zij allen verbleekten van angst.
33. Ik drink thee met koek en confituren.
34. De koe zoogt haar kalf.
35. De koetsier voedert zijn paard.
36. Ik heb een os, een kalf, een koe en een stier gekocht.
37. Het glas viel en brak.
38. Vergeef uwen vrienden hun schuld.
39. De goede man vergaf zijn vriend zijn (diens) schuld.
40. De vogel vloog de tuin in.
41. Ik zie mijn vriendin, de onderwijzeres.



Vertaling van opgave 27.

1. Kiam mi eksciis, kio okazis al li, estis jam tro malfrue por ankoraŭ iri al li.
2. Mia onklo vizitis min hieraŭ; li estis aŭdinta, ke mi baldaŭ forvojaĝos.
3. Estas dezirinde, ke vi regule vizitu (ĉeestu) la kurson.
4. Manĝinte (post kiam ni estis manĝintaj), ni tuj eklaboris.
5. Plezure (kun plezuro) ni plenumos vian peton.
6. Li rakontis al ni, ke li iras la sekvontan (venontan, proksiman) semajnon al Parizo.
7. Ju pli (multe) vi studas, des pli bone vi povos traduki ĉi tiujn frazojn.
8. Estas nekompreneble, ke oni ne akceptis ĉi tiun proponon.
9. Dirante tion, li demande rigardis nin.
10. Lavite kaj vestite, la malgranda knabo rapide iris (kuris) sur la straton, por serĉi siajn kunludontojn (ludamiketojn).

# Handleiding bij het vertalen.

F. Faulhaber.

Tekeningen van Svitberto.

## De betekenis van een woord.

„Zeg, *onbekwaam* hoe vertaal je dat?”

„Dat weet ik niet.”

„Weet je dat niet? Is het dan niet *malkapabla* of zo iets?”

„Ik kan het je niet zeggen.”

„????”

„Nee, daar kijk je nou raar van op, maar ik weet het toch heus niet.”

„Hoe zo?”

„Wel, omdat ik eerst het verband moet kennen, waarin dat woord in de zin voorkomt. Lees de hele zin eens op!

„Er staat: *Hij kwam onbekwaam op z'n werk.*

„O, dan is het *ebria*, want in dit geval betekent *onbekwaam* = *dronken*.

„Zou *malkapabla* dan niet goed zijn?”

„Nee, want dit betekent alleen *niet* in staat, maar niet tevens *wegens dronkenschap*, zoals het nederlandse woord *onbekwaam* in deze zin zegt. *Onbekwaam* heeft twee betekenissen, *malkapabla* slechts één. Er is verschil in betekenis tussen *onbekwaam* in:

*Hij is onbekwaam voor z'n werk,*

en in: *Hij kwam onbekwaam op z'n werk.*

Als we het woord *onbekwaam* in beide zinnen óverdenken in Esperanto, dan vertalen we het in het eerste geval met *malkapabla*, in het tweede met *ebria*. Het is dus van groot belang het verband te kennen, waarin 'n woord gebruikt wordt. Dit verband — zinsverband genaamd — bepaalt de juiste betekenis van een woord. Wij zullen dit nog eens nader toelichten met het woord *kruk*, dat verscheidene betekenissen heeft: 1. stoel zonder leuning; 2. knop van een deur; 3. stok, met behulp waarvan gebrekkige mensen zich voortbewegen; 4. iemand, die zijn vak maar half verstaat. Aan het enkele woord *kruk* hebben we dus bij het vertalen geen houvast. Om de juiste betekenis te kunnen vaststellen moeten we het zinsverband te hulp roepen. Als ik zeg: *Hij greep de kruk*. . . dan weet mijn toehoorder nog niet, wat voor 'n kruk ik bedoel. Voeg ik er achter: *en zette zich voor de piano*, dan is het een stoel zonder leuning (*taburedo*); met: *en opende de deur* is het een deurknop (*anso*); met: *en hij strompelde verder* is het een stok voor gebrekkige mensen (*lambastono*).

Zo hebben zeer veel woorden in onze taal verschillende betekenissen, die echter niet alle gedekt worden door de Esperanto-vertaling, die er in het woordenboek vlak achter staat. Nemen we eens het woord *mens*. Ons woordenboek zegt dadelijk *homo*, en dit betekent: *Dumana mamulo, karakterizata per vertikala teniĝo, racia inteligenteco kaj parolkapablo*. Ook *mens* heeft deze betekenis, maar *mens* heeft bovendien nog andere betekenissen, die *homo* niet heeft. Daaruit volgt, dat *mens* niet in alle gevallen met *homo* kan worden vertaald.

## Voorbeelden:

1. *Een slaapkamertje te huur bij twee mensen.* Moet bij twee mensen nu vertaald worden met *ĉe du homoj*? Neen, want *twee mensen* betekent in deze zin *echtpaar* en die betekenis heeft *du homoj* niet. Met *du homoj* kunnen zowel *twee mannen* als *twee vrouwen* of een



man en een vrouw (zonder meer) aangeduid worden. Men geve dus de werkelijke betekenis weer: *ĉe geedza paro* of: *ĉe geedzoj*.

Toch bevredigt ons deze vertaling niet geheel. Zij geeft nog niet nauwkeurig weer, wat men in dit geval onder *twee mensen* verstaat. Wij lezen in deze advertentie immers nog meer: n.l. dat dit echtpaar geen kinderen heeft, die den slaper met hun bedrijvigheid zouden kunnen storen. We vertalen dus: *ĉe geedzoj sen infanoj*.

2. Naast ons zijn jonge mensen komen te wonen.

*Junaj homoj?* Neen, want dit kan zowel jonge mannen als jonge vrouwen en jonge man(nen) en jonge, vrouw(en) betekenen. Hun aantal kan zowel 2, als méér dan 2 zijn. Wat bedoelen we eigenlijk met *jonge mensen* in deze zin? Wel, *junaj geedzoj* of *ĵus (antaŭ ne longe) geedziĝinta paro*.

3. Een net gekleed jongmens trad de kamer binnen.

Is *jongmens* nu *juna homo*? Als we ons in de geest voorstellen, dat een net gekleed jongmens de kamer binnen komt, wat zien we dan: een jonge man of een jonge vrouw? Wel, een jonge man! (Dus vertalen we: *junulo* of *juna viro*.)

4. Ik hielp een oud mens de straat oversteken. Ziet ge in uw geest, wat ik deed? Was het een oude man of een oude vrouw, die ik naar de overkant bracht? 't Is vreemd in onze taal, maar een *jongmens* behoort tot het mannelijk en een *oud mens* tot het vrouwelijk geslacht! We vertalen dus: *maljunulino* of: *maljuna virino*.

Natuurlijk moet men hierbij het zinsverband in aanmerking nemen. In zinnen, waarin het woord *mens* een algemene betekenis heeft, vertale men het met *homo*, b.v.:

5. Tal van jonge mensen kunnen in deze tijd geen werk krijgen. Oude mensen neemt niemand meer in z'n dienst. Hier wordt niet aan het geslacht gedacht, dus vertale men: *junaj homoj* en *maljunaj homoj*.



Een oud mens



Een jongmens

6. Kijk dat mens eens een rare hoed op hebben! Met dat mens wordt hier een vrouw bedoeld, dus: *tiu virino*. (Daŭrigota.)

---

## Men vraagt ons:

In L. P., blz. 88, vind ik de vertaling: *Sia fiero tentan ŝin imagi sin pli bona ol aliaj*. Is *delogi* niet beter dan *tenti*? Zijn de volgende vertalingen ook goed: . . . ., *ke ŝi imagas esti pli bona ol aliaj* en: . . . . *opinii sin pli bona ol aliaj*. Is *imagi* een wederkerend werkwoord?

*Delogi* is verleiden, verlokken, aflokken, in genoemde zin niet goed (*delogi iun de ties devo, delogi edzinon de iu alia*).

Uw beide vertalingen zijn ook goed, hoewel *opinii* i. pl. v. *imagi* iets minder juist is.

*Imagi* is niet wederkerend. Geen enkel werkwoord is in Esperanto uit zichzelf wederkerend. De wederkerendheid wordt gevormd door toevoeging van *sin*. *Imagi sin* is dus wederkerend, evenals *opinii sin, lavi sin, ĝojigi sin*.

## Por Progresantoj.

Opgave 36. Vertaal in het Esperanto:

### Gekkenpraat.

Dit vertelde mij een reisgenoot in de trein:

„Het zal een jaar of veertig geleden zijn. Ik was toen een jongen van twaalf, maar het heugt me nog als vandaag. We woonden naast een boer, en natuurlijk kenden wij, kinderen, al het volk, dat daar werkte.

Toen gebeurde het, dat van een van de knechts daar de vrouw krankzinnig werd, en ze werd naar een gesticht gebracht, niet ver bij ons uit de buurt. De Zondag daarop ging hij er op uit om haar te bezoeken. En kind als ik was, stapte ik met hem mee.

Toen we bij het gesticht kwamen, wees hij mij met de vinger: let eens op, daar gaat ze! En inderdaad, daar wandelde ze stil achter het afsluithek. En door de tralies stak hij haar een hand toe.

Maar zij keek hem zwijgend aan en zei: „Ben je nog altijd bij boer Van Meersen?”

Hij knikte van ja....

„Heb je nog altijd zeven gulden in de week?”

Hij knikte van ja....

„En werk je nog steeds van 's morgens vier tot 's avonds zeven?”

Hij knikte van ja....

Toen zei ze haast plechtig:

„Man, dan sta je aan de verkeerde kant van het hek!”

Dat vertelde een reisgenoot in de trein.

En hij vond het zó merkwaardig, dat ik met moeite een glimlach bedwong. Want als heel de wereld één gekkenhuis is, wat is dan natuurlijker dan dat de gekken aan de verkeerde kant van het afsluithek staan?

(A. B. K. in „Het Volk” van 7-4-1923).



Vertaling van Opgave 28.

Ĉu vi bezonas ankoraŭ ion, sinjoro?

(Fino.)

La oficisto levis<sup>1)</sup> la ŝultrojn kaj, ridinte afable, diris<sup>2)</sup>: „Sinjoro, vi agas kontraŭ vi mem<sup>3)</sup>. Sed, se vi nepre<sup>4)</sup> ne deziras ion alian<sup>5)</sup>, sinjoro Stiphout, mi ne povas ŝanĝi tion<sup>6)</sup>. Eble alifoje<sup>7)</sup>. Jen la du poŝtmarkoj kvincendaj, kaj kiam<sup>8)</sup> vi denove<sup>9)</sup> bezonas ion, mi esperas, ke vi memoros<sup>10)</sup> min. (Ĉu) eble vi deziras mendi ŝparkaslibreton? Ĉe<sup>11)</sup> la dua giĉeto en la angulo, kaj.... Bontagon, sinjoro, salutojn al viaj edzino kaj infanoj kaj la tuta parenkaro<sup>12)</sup>. Prosperajn<sup>13)</sup> negocojn, sinjoro!” la oficisto ankoraŭ postkriis<sup>14)</sup> al li. Sed la furioza „kliento” jam estis malaperinta<sup>15)</sup>, rapide kiel leporo.

Mir(eg)igitaj<sup>16)</sup> ĉiuj ĉeestantoj estis aŭskultintaj<sup>17)</sup> ĉi tiun strangan interparolon<sup>18)</sup> kaj pro senparola<sup>19)</sup> miro mi forgesis diri, kion mi bezonas<sup>20)</sup>.

„Kion signifas tio? Kial vi agis tiel strange<sup>21)</sup>?” informpetis<sup>22)</sup> kolego de la oficisto.

Ĉi tiu kun kontentega vizaĝo<sup>23)</sup> spiris profunde<sup>24)</sup> kaj diris poste: „Pro venĝo, pro nenio alia.”

„Pro<sup>25)</sup> venĝo?” ripetis la alia nekrede<sup>26)</sup>. „Kion do tiu viro faris<sup>27)</sup> al vi?”

La oficisto ĝemspiris<sup>28</sup>) kaj post tio diris<sup>29</sup>): „Tiu viro<sup>30</sup>), tiu Stip-hout, estas mia razisto<sup>31</sup>). Ĉiutage mi igas<sup>32</sup>) min razi lin ĉe li, kaj ĉiufoje li ne permesas<sup>33</sup>) al mi ekstari, ne ofertinte<sup>34</sup>) al mi sian tutan provizon<sup>35</sup>) da parfumoj, harlavaĵoj<sup>36</sup>), sapoj, razklingoj<sup>36</sup>) kaj aliaj tualetaĵoj<sup>37</sup>) ....

#### OPMERKINGEN.

- 1) Sommigen gebruiken ook wel *suprentiris*, wat o.i. een wat sterke uitdrukking is. *Siajn* is niet nodig; eens anders schouwers haalt men toch niet op.
- 2) Natuurlijk is ook een ander gebruik van deelwoorden goed, bijv.: *levinte*.... *diris* enz. Ook: *kaj diris plu*; niet: *tiam*.
- 3) Ook: *estas*. *Vi estas via propra kontraŭulo* is correct, maar wat lang.
- 4) Of: *absolute*.
- 5) Na *se* behoeft dan niet vertaald te worden; wil men het toch vertalen, dan: *do* of: *tiuokaze*; *tiam* wordt wel gebruikt, maar is niet correct.
- 6) Niet: *nenio estas povebla* (wel: *farebla*); *povi* is een z.g. werkw. van modaliteit, waarna steeds een ander werkwoord gebruikt of minstens bijgedacht moet worden (*povas fari*). Niet: *estas neeviteble*, noch: *ne povas rimedi tion*.
- 7) Ook: *alian fojon* of: *sekvontan fojon*, maar beslist 4e naamval!
- 8) In dit geval is *se* even goed; men vat het dan als een voorwaarde op.
- 9) Of: *ree*. *Eens* behoeft niet vertaald te worden; *kiam* is reeds voldoende.
- 10) Beter dan: *pensos*. Na *espero* geen aanvoegende wijs. Zie „Konsilanto”, blz. 26.
- 11) Ook: *je*, maar een voorzetsel is in ieder geval nodig.
- 12) Beter dan: *familion*, omdat met *edzino kaj infanoj* al het gezin bedoeld is.
- 13) Of: *bonajn*. Niet: *komercon* = groothandel.
- 14) Of: *kriis post li*; de richtings-*n* (*post lin*) is niet verkeerd, maar onnodig.
- 15) Ook wel: *malaperis* of: *forrapidis*, hoewel de volt. verl. tijd hier logisch juist is.
- 16) Ook: *mir(eg)e* of: *mir(eg)igite*. In dit geval kan zowel een bijw. als een bijvoegl. deelw. gebruikt worden.
- 17) Niet: *aŭskultis*; deze werking was al afgelopen. Evenmin: *estis aŭskultantaj*, om dezelfde reden. De volt. verl. tijd is hier de enig mogelijke.
- 18) Niet: *parol(ad)o*. *Inter-* is nodig om aan te tonen, dat twee of meer personen tezamen (onderling) spreken; ook: *konversacion*.
- 19) *Mutiga* is wat erg sterk.
- 20) Of: *deziras*; geen verl. tijd. De zin kan in de directe rede gezet worden.
- 21) Of: *tiom*. Ook: *malsaĝe, idiote, sence*.
- 22) Niet: *informis* = inlichtingen verschaffen; wel: *informigis*; ook niet: *scivolis*.
- 23) Niet: *goja* = *verheugd*. Niet: *trajto* = (gelaats)trek; ook *mieno* is goed.
- 24) Niet: *perforte* = met kracht, met geweld.
- 25) Ook: *el*; zie „Voorzetsels”, blz. 80-2.
- 26) Niet: *nekredante*, noch: *nekredeme*. Hier is noch van enige tijdsduur, noch van een neiging sprake.
- 27) Niet: *agis*; *agi* is niet overgankelijk; wel kan: *spertigis al vi*.
- 28) Niet: *ĝemis* = kreunen, kermen; wel: *spiregis*. Sommige schrijvers bezigen voor *zuchten* een nieuw woord: *suspiri*.
- 29) Ook: *kaj diris plu*.
- 30) *Viraĉo* is hier te sterk; wel kan: *ulo*. Niet: *ĉi viro*. Het is niet gewent *ĉi* onmiddellijk voor een zelfst. naamw. te plaatsen, hoewel sommige schrijvers dat wel doen.
- 31) Ook: *barbiro*; niet: *barbisto*.
- 32) Niet: *lasas min razi*; *lasi* = laten, toelaten, maar niet iets opdragen. Ook: *de li*.
- 33) Niet: *igas min ekstari*; hier is *toestaan* bedoeld.
- 34) Ook: *antaŭ ol li ofertis*; ook: *antaŭ kiam*. *Ne -inte* (= zonder te hebben..) geeft echter de betekenis het beste weer. Niet: *prezentis* = voorstellen, aanbieden.
- 35) *Stoko* kan ook, maar is niet officieel.
- 36) Ook: *harakvoj*. Ook: *razil(et)oj*; niet: *raztranĉiletoj*. Met een scheermes scheert (*razas*) men, maar behoort men niet te snijden (*tranĉi*)!
- 37) Ook: *tualetbezonaĵoj, -artikloj* of *-necesaĵoj*; *tualetiloj* is niet verkeerd, maar wat ongewoon.

# Esperanto en la ĉiutaga vivo.

H. Velthove.

M.: Ja, we hebben er al zo'n beetje over gesproken, maar, waar we naar toe zullen gaan, *weten* we nog niet.

Moe: Nou, *dan mogen jullie wel voortmaken; 't is kort dag*, anders zijn jullie te laat om *pension te bespreken*.

M.: Dat is ook niet nodig, want we *gaan in ieder geval niet in pension*. We zijn van plan om te gaan *trekken*.

Moe: *Daar ziet het weer anders niet naar uit*. We hebben nog niets anders dan regen gehad. *Ik zou maar thuis blijven*. Oost west, thuis best.

M.: Nou, thuis is 't soms ook zo lekker niet. 't Is toch ook nog geen zomer. Het kan nog best omslaan; *en dan*, wie niet waagt, die niet wint. Een regenjas en een flinke dosis optimisme, daar kan je zelfs een nederlandse zomer mee *te boven komen*.... Gut, is 't al zo laat? *Dan sta ik maar weer op, anders ben ik niet thuis*, voor Karel komt.

Moe: De klok gaat een kwartier voor.

M.: *Ja*, maar ik *ben* nu niet op de fiets. Misschien komen we van de week wel oplopen. Tot ziens dan! Groeten aan vader!

M.: Dag! Groet Karel van me!

Jes, ni jam *provizore* priparolis ĝin, sed, kien ni iros, ni ankoraŭ ne *decidis*.

Nu, *vi do baldaŭ faru decidon, la tempo jam urĝas*, por ke vi ne malfruu *por rezervigi al vi lokojn* en *pensiono*.

Tio eĉ ne necesas, ĉar ni certe ne loĝos *pensione*. Ni intencas *migradi*.

*Por tio la naturo ne aŭguras taŭgan veteron*. Ni ĝis nun spertis nur pluvan veteron. *Mi konsilas (al vi) resti hejme*. Ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme.

Nu, hejme ne ĉiam estas ĉarme. Ja ankoraŭ ne estas somero. La vetero povos ŝanĝiĝi, kaj *cetere*, kiu ne riskas, tiu ne gajnos. Per pluvomantelo kaj granda kvanto [dozo] da optimismo oni povas venki eĉ nederlandan someron.... He, ĉu jam tiel malfrue? *Mi do reiru, por ke mi estu hejme*, antaŭ ol Karlo venos [estos veninta].

La horloĝo antaŭas kvaronan horon.

*Ne utilas*; mi ja nun ne havas *biciklon ĉe mi* [ne disponas pri biciklo]. Eble la nunan semajnon ni vizitos vin. Do, ĝis la revido! Salutojn al la patro! Tagon! Salutu Karlon por mi!

---

## Men vraagt ons:

In aansluiting op een vraag in L. P., blz. 64, meent kam. G. J. de V. in Z. een passend voorbeeld gevonden te hebben, waarin *estu vokata(j)* verwerkt is, wat we gaarne nog even plaatsen.

*Word(t) geroepen tot een hoger ideaal, en gij zult begrijpen, dat het leven mooi is = Estu vokata(j) al pli alta idealo, kaj vi komprenos, ke la vivo estas bela.*

# Esperanto 50-jara.

## Revigliĝo.

Mondo bruas kaj tumultas;  
El malbon' malbon' rezultas.  
Sed la vera bono restas;  
Eĉ, en fin' triumfon festas.

En la teruraj jaroj de la mondmilito ŝajnis, ke tiu katastrofo forte influos Esperanton kaj ĝian movadon. La antaŭsentoj tamen ne veriĝis. La sola ŝanĝiĝo, kiun oni povis konstati, estas, ke la esperantistoj ĝenerale perdis sian fidon en la t.n. „interna ideo” de la lingvo. Sed cetere preskaŭ ne rimarkiĝis ia aliĝo. Kvankam la milito interrompis internacian agadon kaj senfortigis la propagandon, pro kio kelkaj jam timis, ke Esperanto mortos, tamen jam antaŭ ol la milito finiĝis, oni povis plufrilate konstati revigliĝon de l'movado: reaktiviĝis la organizoj, refondiĝis gazetoj, denove aperis libroj, kaj baldaŭ la movado estis denove tiom forta, kvazaŭ nenia interrompo estis okazinta.

Ankaŭ la lingvo mem ne spertis ian influon pro la milita interrompo. Unu momenton ŝajnis, ke la literatura lingvo trapasos epokon de aplikado pli intense libera, kiam Privat surprizis nin per sia valorenhava verko „Vivo de Zamenhof”. Sed jam baldaŭ montriĝis, ke la tute aparta kaj eksterkutima stilo de ĉi tiu verko estas nur unufoja fenomeno, poste ne trovanta imiton, eĉ ne de la sama aŭtoro en liaj postaj verkoj. Ekzakte studante la multajn rimarkindajn specialaĵojn de tiu ĉi libro: sintakson, vortkonstruon, fortimpresajn, ofte frape mallongajn frazojn, ĝenerale: tutan ĝian stilon, eĉ gramatikajn apartaĵojn, inter kiuj lastaj troviĝas ankaŭ kritikindaj kaj nekonsekvence uzitaj formoj, oni konstatas, ke la pli multaj interesaĵoj estas karakterizaĵoj el la franca lingvo, pli multe certe permeseblaj, sed ĝis tiam nekutimaj en Esperanto. Oni do venas al la konkludo, ke tiun ĉi impresoplenan lingvaĵon inspiris al la aŭtoro la profundaj sentimentoj ligantaj lin kun la Majstro kaj ties familio, kaj ke malgraŭ la esperantistaj lingvaj talentoj de l'aŭtoro, li esprimis siajn plej delikatajn sentojn kaj impresojn per Esperanto, sed en formo kaj aspekto francaj.

La antaŭmilitan literaturan kaj instruan laborojn daŭrigis Ellersiek, eldonante serion da bonstilaj verketoj sub la nomo „Nova Esperanto-Biblioteko” kaj instruan gazeton „Esperanto-Praktiko”, per kiu lasta speciale li bone influis la internacian lingvo-uzadon; E.P. instruis klaran kaj logikan lingvaĵon.

El la aktiveco de Ellersiek rezultis ankaŭ la eldonado de alia libroserio: „Biblioteko Tutmonda”; el ĉiu el ĝiaj volumetoj tamen esprimiĝis pli malpli aparta stilo. Ni menciuj nur „La Kapitanfilino” de Puŝkin, kiun Ŝidlovskaja tradukis laŭ sia klasika maniero: „La Cikoni-Kalifo” de Bodo, majstre tradukitan de Babits, en stilo, jam montranta signojn de modernigo (pli libera ol kutime apliko de kelkaj lingvaj reguloj, komenco de uzado de *tiom*, *kiom* flanke de *tiel*, *kiel*, uzado de *sin-* anstataŭ *mem-*: *sinakuzo*, *sinmortigo*, preskaŭ regula uzado de kondicionalo post *kvazaŭ* k.s.); „La Malgranda Johano” de Van Eeden en traduko de Bulthuis, bona, flua kaj facilstila, tamen ne sen gramatikaj makuletoj, nekonsekvencaĵoj kaj nederlandismoj.

Veran modelon pri eleganta stilo, ĝusta kaj logika aplikado de la lingvaj reguloj kaj foresto de ne nepre bezonataj komplikitaj formoj prezentas la tradukoj de Brüggeman de la libroserio „Universala Biblioteko”.

Apartan mencion meritas la originala verkado de Bulhuis. En sia komenco (la romano „Idoj de Orfeo”) lia stilo baziĝis sur la simpla formo de Zamenhof, eĉ kun simpla transpreno de pluraj malnoviĝintaj gramatikaj formoj, sed kvazaŭ traplektita per nederlandaj trajtoj. Lia rakontmaniero estas interesa kaj „kaptas” la leganton, pro kio oni facile pardonas la nekonsekvencaĵojn en la aplikado de certaj lingvaj reguloj. Bedaŭrinde estas, ke Bulhuis, kvazaŭ sentante sin jam antaŭe certa pri sukceso de farota verko aŭ traduko, dediĉis al siaj postaj laboroj malpli da zorgo. Pro tio tra liaj verkoj la stilo estas efektive sentebla laŭ linio malleviĝanta. Bona estas ekzemple lia traduko de „Malgranda Johano”, malbonega tiu de „Robinsono Kruso”, el kiu lasta esprimiĝas ĉiuj ecoj de la nederlandaj stilo kaj vortuzado.

La malon oni konstatas ĉe alia aŭtoro: Luyken. En liaj antaŭmilitaj verkoj „Paŭlo Debenham” kaj „Mirinda Amo”, siatempe aplaŭde akceptitaj, montriĝis tra flua kaj eleganta stilo multaj lingvaj neregulaĵoj. Lia postmilita „Stranga Heredaĵo”, kvankam laŭnhave sen-signifa, estas el lingva vidpunkto tre bona; kaj „Pro Iŝtar” superas ĉiujn antaŭajn; ĝia stilo estas ĉarme bela. Kaj tamen, kvankam Luyken ne ŝatas transi kutimojn en aplikado de la lingvaj reguloj, nenie uzas ian lingvoformon tro libere aŭ riske, tamen en ĉiuj liaj verkoj la aŭtoro estas rimarkebla, ĉar tra ĉiuj evolue fluas la sama stilo.

Kaj dume komencis bari al si vojon en la movado iu entrepreno, kiu dum pluraj jaroj havis lingvan influon internacian, nome „Esperanto Triumfonta”, poste nomita „Heroldo de Esperanto”. Diversaj literaturaĵoj aperis en formo felietona kaj (aŭ) estis eldonataj en libroformo, el kiuj tamen nur „La Senlingvulo” de Korolenko (tradukita de Ŝidlovskaja) rimarkindas pro elstara stilo. Aliaj eldonoj (Kloepfer, „Vagabondo kaj Sinjorino”, tradukita de Goppel, A. Tolstoj, „Aelita”, tradukita de Pil, Maxwell „Anstataŭa Edzino”, tradukita de Sampson k.a.) estas ĝenerale tre bonaj, kvankam ne ĉiarilate. Tra kelkaj libroj oni sentas la kontrolan influon de Jung, la eldonisto, kies propra stilo klare esprimiĝas en lia originalo „Landoj de l’Fantazio”, stilo mola kaj neimpona, en kiu nekutimaj vortarangoj vane klopodas impresi poezie.

Tamen, kiom ajn stranga tio ŝajnas, ĉar en la laste nomita libro nekonsekvencaĵoj kaj germanismoj ne mankas, la influo de Jung pere de sia gazeto estis bona kaj kondukis al ĝenerale kontentige logika uzado de la lingvo. Alivorte: Jung sukcesis pli bone kiel lingva kontrolanto ol kiel aŭtoro.

Ĉe la sama eldonejo aperis „En Okcidento Nenio Nova” de Remarque, tradukita en tro mallonga tempo, pro kio la stilo multe suferis kaj kelkaj trafaj esprimoj ne trovis same trafajn tradukojn. Pli bone sukcesis la dua verko de la sama aŭtoro: „La Vojo Returne”, kies tradukon prizorgis Berger.

# Kun ruĝa krajono tra la literaturo. XXV.

Th. Buis.

## Ĉapitro V.

### KAŬZO — MOTIVO — KIALO.

1. *La imponanta figuro de la imperiestro pro pli ol unu motivo (d.e. kaŭzo) ŝajnas al mi inda al ĉies intereso.*
2. *Viro, kies ekstera aspekto vekis lian atenton, kvankam li ne povis trovi la motivon (d.e. kialon aŭ kaŭzon).*
3. *Konvinkita (d.e. e), ke ŝia amanto estis foririnta kun siaj rajdistoj, ŝi ne (plu, antaŭe ŝi havis!) havis kaŭzon (d.e. motivon) ne montri sin publike.*
4. *Ili opiniis do, ke ne ekzistis (d.e. as) ia kialo (d.e. motivo) por ne efektiviigi la planon.*
5. *La aŭtoritato de Kabe estas kaŭzo (d.e. motivo) akcepti tiun ĉi libron (d.e. vortaron aŭ verkon) kiel ĉefan gvidilon.*

La tradukinto rigardas la vortojn *kaŭzo* kaj *motivo* kiel sinonimojn. Ili tamen sufiĉe diferencas inter si. La vortaro de Kabe estas la ĉefa gvidilo de la tradukinto. Nu, mi korektos la manierojn de aplikado kaj pravigas min per la sama vortaro. La vorto *kaŭzo* signifas laŭ Kabe: Tio, kio faris, ke io ekzistas aŭ okazas; tio, de kio io devenas (rezultas), kaj sen kio ĝi ne ekzistus (la leĝo de kaŭzo kaj rezulto! Th. B.) *Kaŭzi* = esti la kaŭzo de io: kaŭzi malordon. *Motivo* = kaŭzo de ago, de konduto: koleri sen motivo. *Motivi* = prezenti motivojn, klarigi per motivoj: nemotivita postulo. La vorton *kialo* Kabe ne donis, sed kiu komprenas la sistemon de la korelativoj, tiu komprenas ankaŭ la substantivan derivaĵon de *kial*.

La nederlandaj vortoj *drijfveer* kaj *beweegreden* (= puŝrisorto kaj movkaŭzo) jam sufiĉe klare montras la sencan de *motivo*. Bezonante traduki en Esperanton la komunsencan vorton nederlandan *reden*, la nederlandano demandu al si, ĉu tiu vorto havas, en lia okazo, irigan, agigan aŭ puŝigan sencan. Se jes, li uzu la radiko *motiv'*, se ne, li uzu *kaŭz'* aŭ la derivaĵon *kialo*. Ĉar en la nederlanda lingvo parolata praktike ne aŭdiĝas diferenco inter *reden*, *rede*, *reede* kaj *reeden*, ni havas por ĉi tiuj samsonaj vortoj jenajn ekvivalentojn: *kaŭzo*, *kialo*, *motivo*, *racio*, *prudento*, *rodo*, *prepari* kaj *ekipi*. Ni, kompatinduloj!

Nun ni rigardu, kial mi korektis la propoziciojn: Pri la unua mi demandas min: „kiajn motivojn povas havi imponanta figuro, do senviva ideo, por ŝajni inda je intereso? Ĉar *motivo* igas agi aŭ konduti, kaj en ĉi tiu frazo neniuj povas konscie agi, neniuj povas havi motivon. Ĉu iu aŭ io povas ŝajni tia aŭ alia? Povas. Kiam mi rigardas tra ruĝa vitro, tiam ŝajnas al mi, ke ĉio estas ruĝa. Kio estas la kaŭzo, ke ŝajne ĉio estas ruĝa? La ruĝa vitro. Tiu ruĝa vitro kaŭzas, ke mi perceptas ruĝon, kie ĝi reale ne estas, do kaŭzas ŝajnon. La imponanta figuro do pro pluraj kaŭzoj ŝajnis....

Dua frazo: „La ekstera aspekto vekis lian atenton, kvankam li ne povis trovi la motivon.” De kio? Ne, ĉi tiu frazo fakte signifas: la aspekto estas la kaŭzo de la vekigo de lia atento; sed li ne povas trovi la apartan faktoron de tiu aspekto, ne povis fiksi kial, aŭ per kio, tiu aspekto vekis lian atenton. Li do ne rigardis la tutan aspekton kiel tion, kio vekis lian atenton, sed nur parton de ĝi, kaj tiun parton — la kaŭzon — li vane serĉis.

Tria frazo: „Ŝi ne plu havis kaŭzon ne montri sin publike, sed nun, kiam li estas foririnta, ŝi montras sin publike. Tiu amanto do estas la motivo, pro kiu ŝi antaŭe ne montris sin publike; li do igis ŝin agi kiel ŝi agis (ne montri sin publike). La amanto estis for, la agiganto, la motivo estis for. Ŝi do ne plu havis *motivon*!

Karaj legantoj, samrezone traktu la ceterajn frazojn, kaj vi havos la saman rezultaton. La kaŭzo de mia kritiko estas la ŝoka fakto, ke multaj esperantistaj verkintoj fuŝas Esperanton enigante en ĝin siajn kutimojn nacilingvaj; la motivo estas la espero povi ĉesigi la abundan fluon da fuŝaĵoj kaj antaŭsavi Esperanton de ĝia malrapida, sed certa dronado en idiotismoj nacilingvaj.

---

## Men vraagt ons:

Naar aanleiding van een in de rubriek „Esperanto en la ĉiutaga vivo” voorkomende uitdrukking „*Ĉu vi volas krediti tion al mi?*” waarin *krediti* gebruikt is als vertaling van *poffen*, ontvingen we van enkele lezers vragen, van andere aanmerkingen op het gebruik van *krediti* en *debeti*.

Het misverstand blijkt voort te komen uit verwarring van termen uit de boekhouding (*debet* en *credit*) en een woord uit het dagelijks gebruik (*crediet*).

Uit inlichtingen van ter zake kundige medewerkers putten we het volgende: *Kiam A. liveras al B. ion sen tuja pago. A. debetas la konton de B., ĉar la ŝuldo de B. signifas por A. (estonta) posedo, kaj la posedoj estas metataj debete en konton.*

*Kiam A. ricevas la pagon de B., li kreditas ties konton.*

Correct zou de klant uit onze rubriek dus kunnen zeggen: „*Ĉu vi volas debeti min (of: mian konton)?*” (Vgl. in het nederl.: *hij is daar debet (schuldig) aan*).

We nemen echter aan, dat termen uit de boekhouding onze klant onbekend zijn; zij zegt daarom: „*Ĉu vi volas krediti tion al mi?*”

Men bedenke dan, dat *kredito* twee betekenissen heeft. In de boekhouding is *kredito* het tegenovergestelde van *debeto*, dus de schulden die een firma heeft tegenover anderen. Ten tweede betekent *kredito*: de mogelijkheid iets te kopen of te lenen, zonder de hierdoor ontstane schuld onmiddellijk te delgen. (*Hodiaŭ pagi vi devas, morgaŭ kredite ricevos. Z.*)

Om elke verwarring te voorkomen lijkt het ons daarom beter op *crediet leveren* niet te vertalen door *krediti* (de term uit de boekhouding), maar door: *doni krediton* of: *liveri kredite*, zodat: *la vendanto donas krediton en; la aĉetanto havas krediton (Havi krediton kaj meriton. Z.)*

Uit het tekeningetje in het Januari-nummer van L.P. blijkt, dat er talen met 7 naamvallen bestaan. Kunt u mij inlichten, welke die talen zijn, hoe die naamvallen heten en hoe de Esperanto-benamingen daarvan zijn?

De in meer bekende talen voorkomende naamvallen zijn:

Latijnse naam:	Esperanto:	Betekenis:
1. nominativus	nominativo	<i>kiu? kio?</i>
2. genitivus	genitivo	<i>kies?</i>
3. dativus	dativo	<i>al kiu?</i>
4. accusativus	akuzativo	<i>kiun? kion?</i>
5. vocativus	vokativo	! (alparolito)
6. ablativus	ablativo	<i>de kie?</i>
7. locativus	lokativo	<i>kie? kiam?</i>
8. instrumentalis	instrumentalo	<i>kun kiu? per kio?</i>

Het latijn kent 6 naamvallen (van bovengenoemde 1—6), het grieks eertijds 8, waarvan 6, 7 en 8 in de andere zijn opgelost. De slavische talen (russisch, pools, tsjechisch, servisch enz.) bezitten 7 naamvallen (1—5, 7, 8), uitgezonderd het bulgaars, dat alleen 1, 4 en 5 kent. Er zijn zelfs talen, die 11 (fins) en meer naamvallen hebben (hongaars, sanskriet enz.).

Is het gebruik van *da* voor een voornaamwoord niet geoorloofd, zoals „Heroldo” onlangs opmerkte (*kelke da tiaj*)?

Wie het eerst verkondigd heeft, dat *da* niet gebruikt mag worden voor bepaalde voornaamwoorden (pers., bez. en aanw.), is ons niet bekend. Wel komt de regel in nederlandse leerboekjes voor — en blijkens „Heroldo” ook in duitse. Noch in het Fundamento, noch in de werken van Zamenhof zelf is er enige grond voor te vinden; en bovendien bezigen alle goede schrijvers *da* voor zo'n voornaamwoord.

De door u bedoelde, naieve, opmerking hebben we ook gelezen en er hartelijk om gelachen, want... Teo Jung had beter gedaan ze in de pen te houden. We herinneren ons namelijk, dat in „Landoj de Fantazio” (schrijver Teo Jung!) vijfmaal eenzelfde uitdrukking voorkomt: *multe da tiaj urboj* (12-13), *momento da tia granda sento* (21-13), *ĉiom da sia riĉaĵo* (113-7), *iom da mia feliĉo* (296-10), *parton da ili* (309-23), benevens de volgende, die met recht foutief genoemd kunnen worden: *neniu de (= el) ili* (29-10), *unu de (= el) ili* (172-33) *du ŝercemuloj, unu de kiuj (= el kiuj unu)* (292-34)

We zouden daarom Teo Jung aan willen raden, bij zijn snuffelen naar eens anders louten wat voorzichtiger te zijn!

---

---

## Redakcia korespondo.

Al k-do P. W. W. en Gr.: Koran dankon pro afabla alsendo de gazeto kun interesa artikolo!

Al k-do N. H. Sch. en H.: Dankon pro via atentigo! Eĉ kun la plej bona zorgo preseraretoj ne estas eviteblaj.

